

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTO-
RÖRELSEN I SVERIGE

UTGIVEN AV GEFLE
ESPERANTOFÖRENING

Officiellt organ för Svenska Esperanto-Förbundet (S. E. F.)

N:o 4.
April 1914.

Redaktör:
R. PEHRSSON
Kraftverket, Älvkarleö.

Ansvarig utgivare:
W. WAHLUND
Gävle.

Lösnummer 10 öre.
Årsprenumeration 1:20 kr.
Annonspris 5 öre pr mm.

La Sveda Esperanto- Tago 1914.

Sajnas, ke vera entuziasmo kaj konsento salutis la proponon de s-ro Backman aranĝi la nunjaran svedan Esperanto-Tagon en Malmö, la loko de la Balta Ekspozicio. Kaj vere tio estas neordinare favora okazo por la svedaj esperantistoj fari, en granda urbo kaj en granda ekspozicio, manifestadon de nia lingvo.

En konsento kun tiu unuvoĉa opinio pri la oportuneco de tiu loko la Sveda Esperantista Federacio nun decidis laŭ la propono prezentita, tio estas, ke la sveda Esperanto-Tago okazu en Malmö, la 26-29 de julio tiun ĉi jaron.

Pri la lokaj aranĝoj la Klubo Esperantista de Malmö promesis zorgi kaj je sia helpo ili havas tian spertan esperantiston kiel s-ro Backman en Helsingborg, do oni povas esti certa, ke nenio mankos en tiu rilato.

Jugante de la vekiginta intereso por Esperanto en diversaj lokoj, oni rajtas esperi, ke la diversaj partoj de nia lando estos pli bone reprezentataj ol ĉe antaŭaj Esperanto-Tagoj. La sukceso dependas de la nombro de la kongresanoj; do estas la devo de ĉiu klubo sendi unu aŭ plurajn reprezentantojn! La kotizo estas fiksita je 3:— kr, kio certe ne timigos iun.

Tiun ĉi someron la tutmonda esperantistaro kolektiĝos al la deka universala kongreso de Esperanto en Parizo, certe ĝis nun la plej imponanta; antaŭe ni svedaj esperantistoj kolektiĝu en Malmö al

unuiga kolektiĝo por nia celo, ebliganta fortan antaŭenpuŝon de nia afero ankaŭ en tiu ĉi angulo de la mondo!



Låt om oss bli skickliga esperantister!

Vi måste bereda tillfälle att ta examen i Esperanto, så att den som så önskar, kan erhålla betyg över sin större eller mindre kunskap, i likhet med vad brukligt är i flera andra länders esperantoförbund.

Många esperantister ha endast som hastigast läst igenom grammatiken och ögnat ensmula i ordboken, och funnit allt ganska gott och lättfattligt. De kunna vara intresserade och entusiastiska, men någon levande och fast kunskap ha de aldrig förvärvat sig. Det är synd. Man bör gå till botten med saken.

För att bli skicklig i Esperanto fordras det *övning* — ingenting *flyger* ju på en utan att man gör den ringaste ansträngning! — och det enklaste härvidlag är att läsa *mönstergill litteratur*. La Krestomatiko, esperantisternas »Folkskolans läsebok» skulle vi kunna kalla den, är ju tillkommen särskilt för detta övningsändamål. Man översätter de esperantistiska styckena muntligen och skriftligen till svenska och efter någon dag översätter man så tillbaka från den svenska översättningen. På det sättet kan man reda sig långt på egen hand. Ett sätt att öva sig är också att översätta ur Nya testamentet till esperanto och

sedan jämföra med det esperantiska Nova Testamento.

Sedan länge tillbaka har det varit min avsikt att införskaffa examensreglerna från samtliga esperantoförbund utomlands och med stöd av dessa göra upp en plan för dylika anordningar här inom vårt land. Men hittills har det stannat vid blotta tanken. Någon annan av våra ledare kanske har bättre tillfälle att utföra denna tanke, och jag vill härmed stöta på dem, som känna sig manade att ta upp ärendet. Vi ha ju det av herr Privat startade examensinstitutet i Genève, och det kan vara skäl att samarbeta, så att examina bli ensartade överallt utan åtskillnad på länder.

Nog av — att lära sig esperanto grundligt och om möjligt skaffa sig betyg på sin kunskap bör vara angeläget för en var esperantist.

En verklig esperantists mission är tvåfaldig, nämligen att *kunna* esperanto och att *utbreda* det. Det ena är lika viktigt som det andra. Och esperantisterna böra veta och ha klart för sig, att det är en ära att vara med om att bana väg för och rotfästa Esperanto. Betänk, det är dock ett alldeles *nytt kulturspråk* som vuxit fram under de senaste 25 åren till likvärdighet med de övriga som språk betraktat, och som internationellt och neutralt dem i flera avseenden överlägset.

Esperanto är värt att grundligt lära redan ur ideell synpunkt. De *praktiska* skälen behöva här icke betonas; man behöver blott ta i sin hand U. E. A:s vackra och nyttiga årsbok för att dessa skola stå i blyxtbelysning för en.

När man som undertecknad varit med som esperantist i nära 22 år och sett hur saken utvecklats sig från en

ringa början till den stora, imponerande, världsfamnande rörelse den nu är, då måste man känna sig livligt övertygad att esperantismen har en lysande framtid för sig och att det för vart år blir allt mer nyttigt och praktiskt att kunna esperanto och *kunna det grundligt*.

Gröna villan, Huddinge, april 1914.

Paul Nylén.



Ett berättligt förslag — de internationella svarsakupongerna på Esperanto.

För några år sedan införde världspostföreningen s. k. internationella svarsakuponger, att användas såsom svarsporto för brev till utlandet, då ju vanliga frimärken ej gälla i andra land. De lyda å 25 centimes och kunna även användas att översända små belopp, t. ex. såsom betalning för en tidning, en mindre bok o. s. v. På grund härav ha de naturligtvis fått stor användning bland esperantisterna och med anledning härav har *Graz* Esperantoförening till Världs-Esperantoförbundet (U. E. A.) ingivit följande förslag.

U. E. A. anordnar en rundfråga angående användningen av internationella svarsakuponger i alla land och alla städer. Varje »delegito» (ombud för U. E. A., som f. n. finnas på bortåt 1,000 platser jorden runt) uppmanas att upprätta en statistik över huru många svarsakuponger (ungefär) som under år 1913 användes av esperantister i hans stad eller distrikt. I *Graz* mottogo och avsände esperantisterna under nämnda tid över 100 svarsakuponger, i andra städer är antalet kanske ännu större. Redan många gånger har man sagt och skrivit att de internationella svarsakupongerna mest användas av esperantisterna, mer än av andra personer. U. E. A. skulle då samla materialet, uppgöra en statistik, som den sänder till världskongressen för post och telegraf eller till den internationella byrån i Bern, med anhållan,

att på de internationella svarsakuponger, som hädanefters tryckas, *trycka texten på Esperanto på framsidan* och på de nationella språken på baksidan!

I Österrike, där tyskan är officiellt språk, äga vi ej svarsakuponger på tyska språket, utan på *franska* (!) Franskan är då det neutrala språket i Österrike för svarsakuponger, under det de i Tyskland tryckas på tyska, i England på engelska, i Ungern på ungerska o. s. v. på framsidan. Man skulle alltså utge svarsakuponger för alla land med esperantisk text på framsidan och nationell text på baksidan. Då äro de *de samma* och *neutrala* för hela världen.

De som mest använda svarsakupongerna hava rätt att fordra, att man trycker dem på deras språk, och det är vi esperantister!



Sveda kroniko.

Borås. — Pri la vivforta klubo esperantista de Borås skribas al ni s-ro Roesel:

La Tagon de l'Anunciacio (25 de marto) nia grupo piede faris ekskurso al »Sjömarkan» apud la Viaredsjö (6 km. de Borås ĉe la ferveja linio Borås-Göteborg). 19 membroj partoprenis, inter ili 8 fraŭlinoj. Ni trinkis kafon en la vilao Lyckebo; oni deklamis, ĉercis, kaj unu el la klubanoj fiksas la partoprenantojn sur la fotografan platon. Oni esprimis la deziron pli ofte dum la printempa kaj somera sezonoj fari tiajn ekskursojn.

Kun tutkoraj salutoj

O. Roesel.

Gotenburgo. — En Sigrud Rudebecks Skola en Gotenburgo kurso gvidas F.ino Gudrun Sörvik, tiea instruistino. La kursaninoj apartenas al la kvina klaso.

En la blindullernejo, 2:a Långgatan 5, s-ro Carl Olsson instruas dekon da geblinduloj en nia lingvo, du fojojn en la semajno.

Stockholm. — La Stockholma Laborista Esperanto-Grupo havis sian jarkunvenon la 5-an de aprilo. Propono pri statutoj estis unuvoĉe akceptata post kelkaj malgrandaj ŝanĝoj. La novelektita estraro konsistas el

S-ro W. Herbst, prez.,

» John Johansson, sekr.,

» O. W. Carlsson, kasisto,

» A. G. Hedberg, vic-prez.,

» John Karlsson vic-sekr.,

Reviziantoĵ fariĝis s-roj Milton kaj B. Sandman kun s-ro G. Lagerman kiel anstataŭanto.

Kiel oficiala organo de la klubo estis unuvoĉe akceptata »La Espero» Ĝi estos ricevata per la monata kotizo.

La membroj de la klubo kunvenas ĉiusemajne por praktiki »la karan», irante al kafejoj, kie ni sidas kaj babiladas tutajn vesperojn. Ne estas bezonate diri ke »la lingvo de la gloro kaj herooj» estas tute malpermesata.

Joĉjo.



Fyrväpplingens pristävlan.

Fri resa till Paris.

Redaktionen av Fyrväpplingen har ändrat programmet för sin pristävlan därefter, att även äldre esperantister kunna tävla om ett av prisen.

Möjlighet att få resa gratis till Paris kan varje esperantist bereda sig genom att snarast (senast den 15 Maj) insända till tidningens redaktion, Skara, fullständig uppgift om namn och adress jämte prenumerationskvitto å Fyrväpplingen. Till var och en som gjort detta, sändes omedelbart den svenska text, som skall översättas till Esperanto.

Varje Esperantist bör delta. Enda villkoret är att vara årsprenumerant å Fyrväpplingen, vars postprenumerationsavgift är endast en (1) krona!

Prenumerera genast!



S. E. F.

Inbetalda årsavgifter:

Rosén, G. Köpman, Köpmangat. 14, *Stockholm*.

Lindström, G. N:o 49, *Bomhus*.
Bergqvist, C. D. Nyforsgat. 50, *Eskilstuna*

Klubo Esperantista de Borås por 25 membroj.

La Kluboj en Karlstad Tidholm k. t. p. kial vi ne venis? Mi atendas Gefle den 22 april 1914 för S. E. F. *J. Helsing*.



Afrika. — I *Alger* (Algeriet) pågår för närvarande en kurs, vari deltaga 60 skolbarn. En kurs med 16 deltagare har öppnats i *Sidi Abdalah*.

Amerika. — Ej mindre än fem Esperantokurser ha öppnats i staden *Arucaju* (Brasilien). — Ett livligt intresse för Esperanto synes finnas på Kuba. Det därvarande förbundet för spridande av Esperanto har nyligen utlyst en tävlan för lärarinnor, som undervisa i Esperanto, i vilken 400 kr. utdelas i pris till den lärarinna som i sin klass kan uppvisa det bästa resultatet.

Asien. — »*Japana Esperantisto*», de japanska esperantisternas organ, som en längre tid legat nere, har nu åter utkommit. — I *Tokio* märkas f. n. en kurs för tjänstemän vid centralpolisstationen, varjämte tjänstemännen vid meteorologiska centralobservatoriet därstädes sammankomma varje vecka för att under ledning av dr. Nakamura, observatoriets direktör, studera Esperanto. — I *Peking* (Kina) har börjats en kurs vid K. F. U. M., i vilken både belgier, fransmän och kineser deltaga. — Flere Esperantokurser förberedas i Persien och den första har redan tagit sin början i *Tarbiat-skolan*. Särskilt i städerna *Tabritz* och *Urmial* är intresset synnerligen stort och man väntar, att kurser skola öppnas även i övriga persiska städer, i synnerhet som *Bahaia-rörelsens* ledare, *Abdul Baha*, uppmanat sina 3 millioner anhängare att studera Esperanto.

Australien. — Nya föreningar ha bildats i *Port Melbourne*, *Mont Albert* och *Lilydale*.

England. — Brittiska Esperanto-Förbundet avhöll i februari sitt årsmöte i London, besökt av över 130 deltagare från alla delar av landet. Bland gästerna märktes bl. a. vår bekante blinde esperantist *John Bergh*, vilken talade om sina erfarenheter i de olika »landskap» av »*Esperantolandet*» han besökt. —

Nya föreningar ha bildats i *Birkenhead*, *Bushey*, *Dunstable*, *London* och *Watford*; nya kurser ha bl. a. öppnats i *Berkhamsted*, där 60 lärjungar från läroverket deltaga, och i *Portsmouth*.

Frankrike. — Komitéen för teknisk undervisning i departementet *Rhône* har upptagit Esperanto såsom examensämne för studerande i handelsinstitutet. — En fransk avdelning av de esperantistiska läkarnes världsförbund har bildats. Särskilda lektioner i Esperanto för läkare givas varje vecka vid esperantistiska centralbyrån i Paris.

Holland. — Ett antal esperantister från olika platser ha vid ett möte i *Amsterdam* beslutat bilda en socialdemokratisk Esperantoförening. — I *Roosendaal* har stadsmyndigheterna gratis upplåtit lokal i en teknisk skola för en Esperantokurs.

Italien. — En kurs pågår i kungl. tekniska skolan i *Santarcangelo di Romagna*. Staden upplåter kostnadsfritt lokal åt därvarande förening. — 5:te italienska Esperantokongressen äger rum i *Bologna* 1—5 oktober.

Ryssland. — De ryska läkarnes Esperantoförbund sammanträdde den 5 mars i Moskva. I en av dess Moskvaavdelning anordnad kurs ha deltagit 31 läkare. — En organisationskomité för 3:dje allryska Esperantokongressen i Moskva för vilken redan tecknats en garanti-summa på 500 rubel, har tillsatts — Nya kurser ha öppnats i *Kiev*, *Kovno*, *Tomsk*, *Charkov* och *Baku*, (i handelsskolan).

Tyskland. — Offentlig examen ägde i mars rum med barn från Berlins skolor som undervisats i Esperanto. 44 elever deltog och proven, som omfattade översättning, beskrivning på Esperanto av en bild, sång på Esperanto och redogörelse för Esperantos språklära, lyckades utmärkt. — Vid Esperantoföreningen »*Merkur*» möte i Berlin i febr. deltog som gäst hr *Larsson* från Stockholm, vilken berättade om sina erfarenheter i fråga om Esperanto.

Österrike-Ungern. — En Esperantokurs för officerare, vari bl. a. 15 officerare ur generalstaben deltaga, pågår i »*Stiftskasernen*» i Wien. — Ett förslag har väckts i Aeronautiska sällskapet i övre Österrike om införande av Esperanto såsom internationella aeronautiska förbundets officiella språk. I en med anledning härav ingiven rapport förordar kapten *Engel* Esperanto varmt och även aeroklubbens vice ordförande, major *Hinterstoisser*, har uttalat sig för förslaget.

Var redo!

Härom dagen erhöj jag från en vän, som jag hittills med ringa framgång bearbetat med alla möjliga skäl, och icke minst med »*La Espero*», för att han skulle lära sig Esperanto, ett brev, varur jag till en varning för dem, som i likhet med min vän ha en viss benägenhet att lägga Esperanto på hyllan, så att säga, som en sak, som man ej har någon användning för, gör följande utdrag:

»På tåget hit var jag i sällskap med en tysk. Då han såg, att jag satt och läste i »*La Espero*», som jag använde som reselektyr, kom han och slog mig i hand. Han talade Esperanto, men jag förstod ej mycket. Det enda jag kunde svara på hans presentation var: mi estas Ö. de Gefle. Han fortsatte tala, men jag stod bet. Du må tro, att jag var arg. Det var första gången, jag var i verklig konflikt med Esperanto. Men nu skall jag arbeta med det!»

Och mitt råd är: gäck du och gör sammaledes!

A & K:o.



La fabelo pri Rozali.

Imitajo laŭ E. A. Karlfeldt.

Matena vent' silentas
en supra de tili',
kaj miã song' prezentas
malgrandan Rozali.
En florgardena kaŝ'
min sekvas ŝia paŝ',
kaj aŭdas mi la vokon:
»Ho mia koramant',
ne lasu vi tiun ĉi lokon,
ripozu ĉe mia kant'.»

Malĝojas mia koro,
doloros la konsci',
sed kantas mi kun ploro
pri mia Rozali
Ĝis de la viv' la fin'
forestos l' amatin'.
Nur estas vizio ŝi pala;
neniam vivis ŝi,
kaj eĉ se ŝi estus reala
ŝin tamen ne trovus mi.

Jln.


Tia estas la mondo.

Tri Uppsala-limerikoj.

Estis junulo en Uppsala
kun soifo tre originala.
Foje okazis ke l' kelnero
ne volis doni pli da biero,
por ke ne okazu io skandala.

Bubaĉo sidis ĉe Grindstugan
aerumante la kapon lentugan
ĉar estis tre varma vetero.
Kiam ne restis eĉ unu monero
li entreprenis kuron forflugan.

Sur la granda strato de l' Svartbeko
maltrankvile staras juna »greko».
Li disŝiris sian pantalonon
kaj volas tial uzi tramvagonon;
tio ja neniel estas peko.



Peresperanta parolad-vojaĝo pri Hungarujo.

La Esperantistaron mi sciigas, ke jam dekkvinmil kilometrojn mi pasis de mia mondvojaĝo, anoncita en la aprila numero de »*Esperanto*». En aŭgusto mi forlasis mian hejmon Szászsebes en la montara Orienta Hungarujo kaj de la Naŭa en Bern mi ŝipiris tra Atlantiko Sudamerikon.

Komisiita de la hungara ministerio de komerco, dum duonjaro mi studadas argentinan komercon, silentigante por tiu ĉi tempo miajn viglajn sentojn kaj ideojn verdajn. Malbabileme mi laboradis ĝis hodiaŭ, sed fine sonas la horo, kiam disvolviĝas la entuziasmiganta verda standardo, kiun altesvingante mi portos tra ĉiuj partoj de l' terglobo!

Ekzistas en Eŭropo unu miljara lando riĉa kaj belega, kvazaŭ kiel pordo inter Okcidento kaj Oriento. Fortan, sanan kulturnacion ĝi enhavas kun progresema komerco, industrio, agrikulturo kaj nekompareblaj naturaj belaĵoj. Tiu mondangulo de 23 milionoj da loĝantoj estas Hungarujo kun la mirinda ĉefurbo Budapeŝt. Bedaŭrinde preskaŭ tute nekonata ĝi estas eksterlande kaŭze de la bela, molsona, sed ekster ĝiaj landlimoj nekonata kaj izolata lingvo hungara.

Ĉu ekzistas pli bona okazo pruvi la praktikecon, utilon, vivkapable-

con de Esperanto? Kun ĝia helpo, internacie mi disvastigos konojn pri la glora historio, popolvivo, nuntempa stato, situacio kaj estonteco de la speciale interesa Hungara reĝlando, prezentos naturajn, artajn belaĵojn, tipojn, naciajn originalaĵojn en multnombraj artaj lumbildoj.

Krom tio en ĉiu vizitata ŝtato statistikajn datojn, informojn fotografajojn mi kolektados pri la landoj, iliaj karakterizaj naciaĵoj, ekonomiaj, spiritaĵoj movadoj; petos kaj donos klarigojn pri eblaj internaciaj rilatoj, ktp. Tiun materion parte mi aldonos al la sekvontaj propagandparoladoj, utiligos ilin en miaj artikoloj en hungara gazetararo, fine prezentos ilin en formo de paroladoj, libroj al hungarlanda kaj tutmonda publiko.

Por partopreni al grandaj vojaĝkostoj, invitontoj pagos ĉirkaŭ 40 Sm. po parolado ekstereŭropa. Por atesti antaŭ oficialaj rondo la rezultatojn atendeblajn, versaĵnan nombron de aŭskultantaro, manieron de aranĝado oni bonvolu sciigi min pri tiuj.

Tra Ĉilio, Ĥinuĵo-Orienta, Japanujo, Siberio kondukos min la verda stelo de la Naŭa en Bern al la Deka en Paris, kie mi antaŭ la kongresanoj resumos la atingitajn rezultatojn, impresojn, spertojn pri Esperantismo en la plej malproksimaj landoj kaj organizos daŭrigon de la paroladvojaĝo en Eŭropaj, Nordamerikaj kaj ceteraj landoj.

Konstanta adreso en mia hejmo estas: *L. Keleti*, Szászsebes (Hungarujo); direkta, sed provizora ĝis 30 marto: *L. Keleti*, poste restante Buenos-Aires (Argentino). Mi petas certigi la alvenon de skribaĵoj per rekomendo.

»Esperanto.»



Varför icke

göra den svenska Esperantorörelsen en tjänst och Eder själv ett nöje genom att prenumerera på


La Espero?

Varje medlem

av Svenska Esperantoförbundet erhåller *La Espero* gratis. Afgiften, 2:— kr, insänder till kasör *J. Helsing Gävle*.

Bliv medlem!

Esperantister.



Paul Nylén.

Paul Nyléns namn är känt och uppskattat icke blott inom den svenska Esperantorörelsen utan även utanför vårt lands gränser. En av dem som var med vid Esperantorörelsens första genombrott, och en bland dess främsta kämpar i Sverige, har han aldrig lämnat ur sikte den sak han redan vid sin studietid i Uppsala omfattade med hänförelse. Sin kanske största insats gjorde han under den tid, då han förestod den enda Esperantotidning, *Lingvo Internacia*, som då förenade esperantisterna i skilda länder. Sedan dess har förhållandena ändrats, Esperantorörelsens centrum har flyttat sig, men fortfarande står Paul Nylén i första ledet, då det gäller att göra något för Esperanto.



Nia blindula kongreso.

Permesu, karaj legantoj, ke mi ree turnu min al vi kun arda alvoko por la blinduloj.

Vi scias, kiel grava ŝajnas al mi tiu ĉi demando ne nur el problindula vidpunkto, sed ankaŭ el nia pure esperanta.

Mia konvinko estas, ke, kiam oni konstatos la praktike grandan utilecon alportatan de internacia lingvo al la tutmonda blindularo, oni ne plu povas nei ĝian utilecon por ĉiuj ajn homoj ankaŭ.

Tiun pruvon, sur la blindula kampo, mi tre dezirus montri fakte dum nia Deko Kongreso, en Parizo.

Sed ebla ĝi estos nur, se ĉiuj helpas al mi laŭ sia povo kaj forto.

Jam la franca Ministro de Internaj Aferoj bonvolis pruntedoni al ni senpage por la geblinduloj dormoĉambregojn en la *Nacia instituto por junaj geblinduloj*.

Aliajn ĉambregojn ili havos por siaj laborkunsidoj, en kiuj ili diskutos ne lingvon, ho ne! sed la praktikajn aferojn, kiuj ilin koncernas: enkonduko de Esperanto en iliajn lernejojn, blinduskribilaroj, internacia biblioteko, rabatoj por la poŝtsendado de punktrelefaj libroj, masaĝlernejoj, k. t. p.

Pri la nutrado dum la Kongreso ni zorgis, kaj ĝi ankaŭ nenion kostos al niaj blindaj samideanoj.

Sur la francaj fervojoj, kiel ĉiuj kongresanoj, ili havos gravan rabaton, kaj de tiu ĉi flanko ankaŭ por ili ne tro granda estos la elspezo.

Fine la Kongresa Komitato konsentas al la neriĉaj inter ili, kiel jam okazis en Cambridge, diversajn tute ŝatindajn donacojn.

Aliparte oni nun organizas en Parizo grandan komitaton de Sinjorinoj, Esperantistinoj aŭ simple blindulamikinoj, el plej altaj kiel modestaj klasoj, sub espereble eminenta patronado, kies celo estos alporti iom da distrajo, da ĝojo, da tutmonda lumo, al la geblinduloj pere de nia kara internacia lingvo.*

* *Protekta Komitato de Esperantistaj Blinduloj*. —

1) Okaze de l' internacia Kongreso de Esperantistaj Blinduloj, kiu havos lokon en Parizo dum Aŭgusto 1914, estas fondita Protekta Komitato de Esperantistaj Blinduloj.

2) La celo de tiu ĉi Komitato estas faciligi al la Blinduloj la lernadon de *Esperanto*, kiu havigas al ili altvaloran distrajon, alportas al ili grandan ĝojon, plivastigante ilian horizonton ĝis la blinduloj de plej malproksimaj landoj kaj, jam nun, faras al ili grandan servon, tial ke, dank' al ĝi ili povas per reciprokaj sciigoj kunlabori internacie por la plibonigo de ilia sorto.

3) La Komitato konsistas nur el protektantaj sinjorinoj, de kiuj oni petas antaŭ ĉio kaj precipe la moralan apogon de ilia nomo kaj de ilia simpatio.

4) La titolo de *Protektantino* kunportas kun si neniun kotizaĵon nek ian ajn specialan devon, se ne, ke oni interesiĝu al la progreso de Esperanto en tiel kortuŝanta mondo de la Blinduloj.

5) Tiun ĉi progreson oni konigos al la protektantaj sinjorinoj per paroladoj aŭ cirkuleroj.

La Sekretario:

Th. Cart

12, rue Soufflot (Paris).

La helpa Sekretariino:

Marie Larroche

55, rue de Vaugirard (Paris).

Tion nun mi petas de vi, amikoj, ke, se eble, vi starigu en via lando, en via urbo, en via grupo, samajn komitatojn, turnante vin ne nur al la koro kaj bonfaremo de l' Esperantistinoj, sed al tiu de ĉiuj virinoj.

Kun ilia helpo vi sukcesos sendube altiri la ĝeneralan atenton kaj ĝeneralan simpatian sur niajn esperantistajn blindulojn, — plej grava profito ne nur por la blindularo, sed ankaŭ por Esperanto, — kaj vi plie trovos rimedon por sendi Parizon lertan, Esperante bone parolantan blindulon, kiun vi povos preni kun vi, kaj al kiu ĉiumaniere vi povos faciligi la veturadon. Tute necese estas, por ke utila kaj konvinka estu nia blindula kongreso, ke sufiĉe multaj, diverslandaj kaj elokventaj estu la en ĝi partoprenantoj.

Ne rifuzu, amikoj, vian kunlaboradon al la Blankbarbulo kaj pardonu lian certe ne tro oftan insistemon.

Th. Cart

(12, rue Soufflot, Paris.)

P.-S. — Sciigojn donos tre volonte: por *Anglujo*, s-ro Adams, Plympton Terrace, Hastings; s-ro P. O. Merrick, Elvetham Shepperton; por *Belgujo*, Frato Isidore. Woluwe-Bruxelles; por *Bohemujo*, Prof. Macan, Klarov, 131 III, Praha; por *Danujo*, Prof. Wulff, Nyhavn, 34, Kopenhago; por *Germanujo*, Gesinjoroj Zapater-de-Chalmot, Neue Mästrichterstr. 15, Köln; por *Rumanujo*, s-ro Prezenti Levi, Vatra Luminosa, Bukarest; por *Svedujo*, s-ro H. Thilander, 12 Majorsgatan, Stockholm.

(El *Esperanto*, 5 Marto: *Bileto de Blankbarbulo*.)



Libroj kaj gazetoj.

»*Mirinda Amo*.» — Romano originale verkita en Esperanto de s-ro H. A. Luycken. Eldonita de la Brita Esperanto Asocio. Prezo broŝ. 1.25 sm.; lukse bindita 1.75 sm. —

Kun intereso mi atendis tiun libron de la esperanta aŭtoro s-ro Luycken, ĉar mi aŭdis multe pri lia unua esp. originalo, »Paŭlo Debenham» tiu libro, kiu en la gazetaro ricevis tiajn bonvortojn kaj kiu estis multe disvendata.

Tuj kiam mi ricevis la romanon »*Mirinda Amo*», mi trastudis ĝin kun streĉita atento. Kun granda intereso oni sekvas la heroon en la libro, la ĉiam veroserĉantan Vilfridon, el lia infaneco en la trankvila, senzorga vilaĝo Longseaton al la granda mondurbo Londono. Li estas certe simpatia homo, kaj lia problemoj estas, per la vero solvi la misterojn de la vivo. Lia amatino, la dolĉa, agrabla Flora; lia patrino, la nobla, sentema »fraŭlino» Lambert kaj ankaŭ lia onklo Silas Hutton, kvankam nekredema homo, estas ĉiuj simpatiaj personoj, kiel ankaŭ la hinda princo s-ro Kunwar Kriŝna. Ĝiuj estas personoj meritantaj konon, oni respektas iliajn amikecojn kaj se oni konatigis kun ili oni ne facile forgesas ilin. La aŭtoro diras, ke »ŝi serĉis kaj trovis siajn plej bonajn amikojn en la libroj», tion ĉiu sincere povas diri pri tiu libro.

Estas mirinde per kia facileco kaj lerteco la aŭtoro pritraktas la plej diversajn temojn kaj tipojn. En recenzo pri »*Mirinda Amo*» oni diris, ke la materialo povus liveri temojn por dek sandikaj romanoj; tion mi kredas.

La libro havas 295 paĝojn. Kun ĝojo mi aŭdis de la aŭtoro, ke la libro vendiĝas mirinde bone. La libro estas bona pligrandigo de la esperanta literaturo kaj multvalora verko, kiu ne devas esti mankanta en ia biblioteko de literaturamanta esperantisto.

Mi rekomendas la libron al ĉiuj niaj samideanoj, kun kredo ke ili, kiam ili legis la libron, kun intereso atendos plurajn verkojn de tiu sama aŭtoro.

E. A.

Gvidlibro tra Stirio, eld. de »Landesverband für Fremdenverkehr» en Stirio. Antaŭ nelonge aperis bela Esperanta gvidlibro tra Graz kaj nun venas same bela, riĉe ilustrita gvidlibro tra la aŭstria provinco Stirio, »tiu brila smeraldo en la fiera imperiestra krono de Aŭstrio». Kaj leginte ĝin, oni devas konstati, ke tiu lando certe meritas esti iom pli bone konata de niaj svedaj turistoj ol ĝi ŝajne estas. Al tiu impreson multe helpas la nombriĉaj kaj diversaj ilustraĵoj, kiuj ornamas la interesan broŝuron.

Ricevebla kontraŭ respondkupono ĉe »Landesverband für Fremdenverkehr in Steiermark», Hauptplatz 12. Graz, Aŭstrio.

»*Fluganta Skribilo*,» monata stenografia gazeto. Ĝi estas organo por la Duploye'a stenografia sistemo,

unu el la plej uzataj francaj sistemoj, kiu ĵus estas adoptita al Esperanto. Redaktoro estas s-ro P. Flageul, kiu kune kun s-ro R. Cail-lard verkis la unuan esp. lernolibron de la sistemo. — Abonprezo 1: 50 frankoj (1: 10 kr.). Ricevebla ĉe s-ro P. Flageul, 9 Bd Voltaire, Issy-les-Moulineaux, Seine, Francujo.



På grundvalen av den teoretiska och delvis praktiska kännedom om olika språk, österländska och västerländska, som jag besitter, anser jag Esperanto vara överlägset alla av mig kända språk på grund av dess enkla och regelbundna grammatikaliska byggnad och dess ordföräds utvecklingsmöjligheter och såsom ett av de bästa och lättaste ur uttalets synpunkt. Om ett av den civiliserade världens levande språk ägde dessa egenskaper skulle dess betydelse för all slags internationell verksamhet vara omätlig. Men då ett sådant levande språk icke existerar, hjälper ej annat än strävandet att giva liv åt Esperanto.

Dr. J. G. Ramstedt

docent i lingvistik vid Helsingfors Universitet.

»Finna Esperantisto»

»Esperanta Biblioteko Internacia.»

Kune kun la ruĝaj kaj verdaj kajeroj sur mia speciala esperantobreto troviĝas ankaŭ aro da malgrandaj grizverdaj libroj, kiuj iom post iom plimultiĝis dum la pasintaj jaroj. La laste ricevita kajero portas la numeron 28 kaj ili ĉiuj havas la komunan titolon »Esperanta Biblioteko Internacia.» Ŝajnas ke la esperantistoj ŝatas tiun ĉi kolekton, ĉar la diversaj kajeroj estas eldonitaj en relative grandaj nombroj. Tiu rezulto ja verŝajne estas parte kaŭzita de la facila aĉeteblo — en ĉiu esperanta librovendejo kaj je oportuna preso — sed la sukceso kompreneble dependas ankaŭ de la interna valoro kaj lingva kontentindeco.

Tiu ĉi libraro verŝajne ne estas tiel konata en Svedujo, kiel ĝi meritas, kaj pro tio oni devas sincere bedaŭri la svedajn samideanojn. Estas ja vere, ke esperanto-

literaturo estas proporcie multekosta, precipe pro la afrankokostoj tiel por mendo kun mendo kiel por la sendo de la libroj. Sed iom da literaturo oni tamen nepre devas posedi. Lernolibroj kaj kursoj ne sufiĉas por akiri planan konon pri iu lingvo — eĉ ne rilate al Esperanto kvankam ĝi estas kiel eble plej facile lernebla — necese estas legi ĝian literaturon. Kaj cetere kaj precipe: kian utilon oni trovas per lernita lingvo, se oni ne uzas ĝin iamaniere? Se oni lernis la internacian helplingvon, oni povas tre konvene uzi ĝin ankaŭ por legi tre interesajn literaturajn, kiuj ne estas eldonitaj en la sveda lingvo. Kompreneble oni ne malatentu aliajn manierojn por uzi Esperanton, sed tial oni ne forgesu la ŝatindan literaturon de la lingvo. La celo de tiuj ĉi linioj efektive estas iom reklami la komercan entreprenon de la firmo Ader & Borel en Dresden, sed tio ne okazas por la profito de la nomita firmo, sed por doni al la dise loĝantaj svedaj samideanoj kelkajn informojn.

»Esperanta Biblioteko Internacia» estas eldonata kiel kajeroj po proksimume 40 ĝis 60 dense presitaj paĝoj, kaj ĉiu kajero kosta 10 spesdekojn (t. e. iom malpli ol 20 öre). Certe la diversaj kajeroj povas esti riceveblaj per ĉiu svedlanda librovendejo, se oni precize indikas la titolon kaj la eldonfirmon (Ader & Borel, Dresden), sed ĉe tia mendo oni kompreneble devas atendi kelksemajne la ekspedon, kaj eble eĉ riski malzorgon. Cetere la kajeroj estas kontentige belaj je aspekto; la papero estas bona kaj la preslitteroj klaraj kvankam densaj. Esperantolibroj ordinare estas dense presitaj, ĉar la poŝtaj tarifoj necesigas tion. Rilate al internacie disvendota presaĵo oni ne insistu pri »grova korpuso med mellanslag».* (Parenteze: jen svedlingva ekzemplo ke faka lingvo ne estas ĝenerale komprenebla. Professor Ostwald tamen pretendis ke la internacia lingvo devas esti bazita sur faka terminaro, dum la esperantistoj opinias ke la komune uzata lingvo estu ĝia bazo.)

La unu kajero (eldonita en 1909) estas malgranda krestomatia »Legolibreto» de Jean Borel, Ĝi fariĝis presita en ne malpli ol 14,000 ekzempleroj, kaj tiu nombro povas esti interesa kiel statistika cifero. La dua kajero enhavas kvin

fabelojn de Andersen, tradukitajn de nia neniam forgesota dana samideano Skeel-Görling. Al skandinavo tiu kajero ne prezentas novajn, ĉar »la brava stansoldato», »la fajroŝtalo», k. t. p., estas ja konataj de ni jam de longe. Sed la traduko estas tre bone farita en nepre simpla kaj klara stilo.

Plena raporto pri la enhavo de ĉiu sekvinta kajero verŝajne fariĝus iom tro granda rilate al la amplekso de La Espero. Nur tion oni devas diri, ke ili estas tre diversaj je la enhavo, kaj ke ili nur havas unu komunan kvaliton, kaj ĝi estas la ĝenerale nedisputebla lingva boneco.

Nur pri la kvar plej novaj kajeroj ni tial donu rezencojn.

N:o 25. *Noveletoj el la Nigra Arbaro* de Helene Christaller, tradukitaj de ŝia parenco Vilhelm Christaller. La rakontoj estas bonhumoraj kaj simplaj priskriboj el la vilaĝana vivo en Svarevald. Ĉu la traduko de tiu geografia nomo (»la Nigra Arbaro») estas bona, pri tio oni eble rajtas havi diversajn opiniojn. Certe estas, ke almenaŭ la publiko en nia lando ĝenerale konas la germanlingvan originan nomon Schwarzwald, sed ke ni nur malfacile rekonas ĝin en la Esperanta formo. Sed kontraŭe la franelingva publiko havas por la nomita regiono specialan terminon, kiu eble pravigas la uzitan nomtradukon, cetere klarigitan en la antaŭskribajo. Tamen la lingva konsekvenco (»logiko») estas malpli grava ol la kompreneblo. Kun surprizo oni trovas la vorton *pastoro* kun senco de nia sveda *kyrkoherde*. Ĝis nun oni ĝenerale uzis por tiu senco la kunmetitan vorton *parohestro*. Eble estas ia germanismo, ke la tradukinto hezitis uzi tiun tradician esprimon, verŝajne konvenan ĉiulande krom en Germanujo, kie tro laŭvorta kompreno povus doni la rezulton *Gemeindevorsteher* — laika komunumoficisto. Cetere ni scias, ke kelkaj katolikaj esperantistoj volas vidi en la vorto ankoraŭ alian signifon. Ĉiuokaze ia diferenco inter pastro kaj pastoro ne estas difinebla per la etimologio de la vortoj, kaj tial oni devas konstati ke la uzita formo estas almenaŭ tre malklara. Sed la libro entute tamen estas tre facile legebla, kaj la stilo estas flua kaj malpeza.

N:o 26 *La intervidiĝo kaj Nekonita dialogo* de Alfred de Vigny, tradukis nia esperanta majstro Sam Meyer.

* dika korpuso kun liniintermeto.

Sed — — — por legi kaj tute kompreni tiujn ĉi rakontojn, oni certe bezonus pli detalajn konojn pri la mondhistorio (kaj eĉ speciale la franca historio), ol havas la granda publiko en Svedujo. La tradukinto do donis la du rakontojn precipe al limigita aro da legontoj, kiuj nepre ŝatos la per vortoj faritaj interesaj kvazaŭ portretoj de Ludoviko XIII-a, kardinalo Richelieu, Napoleono I-a kaj Pio VII-a.

N:o 27. *La patrino* de Ernst Zahn, tradukis J. Šmid. Jen libro por pli granda publiko. La verkisto apartenas al tiu skolo, kiu karakterizis la svedan literaturon de la 80-jaroj, kaj kiu ankoraŭ floras en kelkaj landoj. La rakonto estas interesa sed malĝoja priskribo el svisa vilaĝo, iom pri bono kaj malbono en la homa karaktero, pli multe pri la tragiko en la homa vivo. Konforme al la esenco la stilo estas malpli flua, sed ankaŭ pli preciza, ol en la traduko de S:ro Meyer. Evidente la ambaŭ librojn fidele repegulas la stilojn de la originaloj. Nia lingvo estas ja tia. Se kompetenta persono zorge tradukas ion el sia nacia lingvo al Esperanto, la rezultato estos ja pli bona ol kiam oni tradukas el unu al alia nacia lingvo.

N:o 28 *Elzasaj legendoj*, tradukis Charlotte Pulvers. Simplaj, naivaj kaj edifaj historioj, rakontitaj en vilaĝoj, kien la moderna vivo ankoraŭ ne penetris. Generale la rakontoj konservas pure mezepokan ŝajnon — ili estas kvazaŭ sensaĝe notitaj tiel, kiel ilin rakontis la vilaĝanoj dum multaj jarcentoj. Nur kelkloke oni trovas aldonadojn, aŭ lirikajn priskribojn, kiuj al la leganto efikas kvazaŭ anakronismoj, ekzemple la du unuajn alineojn de »Sankta Odilia«. La tradukistino meritas komplimenton pro sia resuma stilo, klara kiel fonta akvo. Pro la simpla frazkonstruo la malgranda libro devus esti tre taŭga legolibro por Esperantostudentoj jam ĉe tre frua stato.

Ĉu la kolekto baldaŭ prezentos al la tutmonda esperantistaro iun el niaj svedaj lingvoartistoj, ekzemple Per Hallström aŭ Verner von Heidenstam?

Rigardanto.



Bär Esperantostjärnan!

Alvokoj.

Ekspozicio de la pedagogia gazetaro tutmonda la unuan fojon estas okazonta en la fako »lernejo kaj libroindustrio de la Internacia Ekspozicio de libroindustrio kaj Grafiko» en Leipzig. Pripensante, ke sole en Germana lingvo eldoniĝas proksimume 450 pedagogiaj gazetoj kaj ĵurnaloj plej diversspecaj, oni certe povas esperi, ke, se partoprenos ĉiuj nacioj, tre interesa kaj instrua entrepreno prezentigos. Por konsideri ankaŭ la historian vidpunkton, karakterizaj ekzemploj el la evolucio de la pedagogia gazetaro, ĉu originaloj ĉu reproduktaj, estas elmetotaj. Oni klopodos, ekspozicii numerojn, kiuj enhavas historie gravajn artikolojn aŭ paroladojn de eminentaj pedagogoj de l'estinteco. Detale oni per apartaj grupigoj montras la intensan multspeciĝon de la pedagogia gazetaro: ĵurnaloj, kiuj speciale servas al virina instruado, propagandos la ideon de l'»laborinstruado«, celas iun apartan fakon de l'instruado ktp., estos kunmetataj. La pedagogiaj gazetaroj germana estos ordigita laŭ landoj. Per tabeloj kaj desegnaĵoj, oni provos montri statistikon pri nombro, grupigo, disvastiĝo, evolucio ktp. de la pedagogia gazetaro. Fine estos ekspoziciata la literaturo, kiu sin okupas pri la pedagogia gazetaro, ĉu laŭ historia aŭ bibliografia vidpunkto, ĉu alimaniere. Kunlaborado, alsendo de ekzempleroj kaj de alia materialo, precipe informoj pri eksterlandaj pedagogiaj ĵurnaloj, rilate iliajn titolon kaj eldonejon estas insitaj petataj. Pri la aranĝo de la supre citita fako de l'ekspozicio estas komisiita

instruisto kaj redaktoro *Max Döring*, Uhländstr. 29 II; Leipzig, (Germanujo).

Al la ĉiulandaj kaj ĉiumetodaj esperantaj stenografistoj.

Karaj gekolegoj!

Tiun ĉi jaron estas okazonta en Parizo de la 2-a ĝis la 10-a de Aŭgusto, la deka universala kongreso de Esperanto. Ŝajnis al s-roj Flageul, L. Chillard kaj mi, ke tio estas bonega okazo por kunvenigi la ĉiulandajn kaj ĉiumetodajn esperantistajn stenografistojn.

Ni do petas vin ĉiujn, ke vi bonvolu sciigi nin, kiel eble plej baldaŭ, ĉu ni povas fidi vian aliĝon. Jam s-ro P. Flageul sciigis la organizan

Köp endast

FREJ-VELOCIPEDER

de äro erkändt lättgående, eleganta och i längden billigare än de flästa.

Gefle Velocipedverkstad

S. Centralgatan 18, GEFLE.

Priskurant å velocipeder och delar gratis. Återförsäljare erhålla hög rabatt.

Desegnisto

deziras oficon en tuboteknika firmo. Li akceptas ankaŭ oficon de kia ajn simpla metio. Respondo al la redakcio de La Espero.



Gävle Esperantoförening

avhåller ordinarie möte tisdagen den 5 maj kl. 8 e. m. å »Nya Hotellet» Centralpalatset 2 tr.

Därvid förekommer bl. a. SÅNG, MUSIK och DANS. Kaffe serveras. Entré 75 öre. Alla välkomna! Styrelsen.

komitaton de l' kongreso pri nia intenco. Ni ĝin denove certigos al li kaj faros ĉiujn necesajn aranĝojn tuj kiam ni estas ricevintaj sufiĉan nombron da respondoj. Bonvolu do rapide skribi al »*Fluganta Skribilo*», 9 B-d Voltaire, Issy-les-Moulineaux (Seine) Francujo, ke vi aprobas nin kaj ke vi estos niaj kaj ke via rekonigila krio estu:

Vivu la stenografio! Vivu Esperanto!

L. Demarey,

Leĝoscienca Licenciato,
Profesoro de stenografio.



Korespondado.

Anonceto pri korespondado kostas 40 oeroj (2 respondkuponoj).

Frankrike. S-ro Paŭlo Lebaudy, 37 Rue Brochant, Paris, deziras interŝanĝi p. k. il. kun gesamideanoj de ĉiuj landoj. Poŝtmarko sur bildflanko. Ĝiam respondos.

HERRAR

ekipera sig bäst och fullständigast hos

Axel Lidholm

Drottninggatan 30 - - GEFLE

Kiam vi bezonas
viandon, mendu
ĉe

FRANS A. OLSON

Telef. 34 □ GEFLE □ Telef. 34

*Presenter inköpta hos
Juvelerarefirman*

A. U. Wahlberg, Gefle

äro alltid välkomna.

Filial i Bollnäs.

Josef Wikströms

Tobakshandel
GEVALIAPALATSET - GEFLE

Central- och Jernvägshotellen

GEFLE

REKOMMENDERAS!

Carl Larssons

FOTOGRAFIATELIER

NYGATAN 34

Rekommenderas!

TELEFON 357

Sport- & Fotografiska artiklar

A.-B. Axel Karlstrand

Rikst. 12 27 GEFLE Rikst. 12 27

C. J. LINDH

BOK- & DISTRIBUTIONSÄFFÄR

S. FÄLTSKÄRSGATAN 19, GEFLE

Rekommenderar sig vid behov av
Böcker, Tidskrifter och Häftesarbeten.

RIKSTELEFON 16 97.

Kafé Linnéa

(Nykterhetsvännernas Kafé)

NYGATAN 34 - (Pousettska huset)

TELEFON 859

Frukostar, Middagar och Soupéer.
Smörgåsar, Kaffe, The o. Choklad m. m.
Beställningar för mindre sällskap.

LOVISA HÖRLIN.

SKODON

Största sortiment hos

A. M. Zimmerman & C:o

PROVU LA KOPIOKRAJONON ESPERANTO!

3:— kr. por dekduo. 30 oeroj por unu.

W. WAHLUND, GEFLE

Kort lärobok i Esperanto

av **Carl Ohlsson.**

Pris 50 öre.

erhåles hos författaren, adress: 2:a
Långgatan 32, Göteborg.

Wickmans Kappaffär

NORRA KUNGSGATAN 7 - GEFLE

Vid Rådhusplanaden.

Kappor o. Promenaddräkter i stort urval.
Beställningar emottagas o. utföras förstklassigt.

RIKSTELEFON 1391.

Gust. Holms Förstoringsanstalt

Brunngatan 78, Gefle. •• Rikstel. 16 28.

Utför förstoringar efter fotografi.
Förstklassigt arbete. Begär priskurant.

Kort Lärobok i Esperanto

för nybörjare av

ALBIN ZACHRISSON

Läroverksadjunkt, Karlstad.

Rekvireras pr kontant hos förf., Karlstad.

PRIS 75 ÖRE.

Varje Esperantist

bör rekvirera Svensk-
Esperantisk ordbok av
E. L:son Finn. Innehålls-
rikaste ordbok i sttt slag
(132sidor). Erhåles porto-
fritt om kr. 1:50 sändes
pr postanv. till författaren,
— adress: *Uppsala* —



N. Lundgren

GEFLE - Interurba tel. 151

Kamentuboj por fabrikoj.

Pli ol 700 konstruitaj.

Riparoj dum uzado.

Fulmkonduktiloj estas muntataj.

Propra brikejo en Upsala.

Plej granda firmo por konstruo de
fabrikaj kamentuboj en Skandinavio.


Argenta medalo en Stockholm 1897
, , , Gefle 1901
, , , Norrköping 1906

Ozarowsky & Pehrssons

Bleck- & Plåtslageri

N. Kopparslagaregatan 15, Gefle

TELEFON 188



Finna Esperantisto

Officiala monata organo de Esperanto-Asocio
de Finnlando. • Abonprezo 3:— Fmk.

Adreso: **S-ro Albin Sandström,**
11, Köpmangatan, *Helsingfors.*